


Bulgara ESPERANTISTO





Nova E-kurso en Vraca. Gvidanto Radoslav Tričkov — Esperanto-veterano kaj Elstara E-Lektoro.

Redakta Komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BORO-VANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Maria JAN-KOVA, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Flori NIKOLOV.

Sekretario-administranto: Metodi Garev

Korektis: M. Elenova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

ENHAVO

* * * Pensoj de eminentaj bulgaroj, naskitaj en decembro	II
* * * 120 jaroj ekde la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof	1
L. L. Zamenhof. Al la naŭoj	2
* * * La antaŭkongresa konkurado en marŝo	3
Dimitro Haĝiev. Porpaca E-renkontiĝo en Kjustendil	4
M. E. Naskiĝis la unua infana Esperanto-Teatro	5
* * * Medicinista esperantista societo en Sofio	6
Cvjatko Todorov. Kunveno pri GDR	6
Nikola Mladenov. Ĉiam pli sukcesa Esperanta tendarlernejo en Druĵevo	7
Valentin Angelov. La lernoĵaro en Polski Trâmbeŝ	7
Dimitro Mutuŝev. BET devas avanci plu (intervjuo kun A. Anev)	8
* * * Rektoro-esperantisto	8
* * * Titolitaj E-lektoroj	8
Prof. A. N. Kameŝkov. E-aktiveco en Leningrado	10
Milica Sokolova. Forpasis d-ro V. V. Butorin	10
Elmar Ratassepp. E-novaĵoj el Estonio	10
Nedka Petrova. Gaste ĉe armenaj amikoj	10
Irida Basko. La koro ne kredas al morto	11
Nevena Nedelĉeva. La plej bona heredaĵo	11
H. M. G. Kolonelo Diĉo Petrov	14
Canko Murgin. Rene Dekart.	15
* * * Etaj humuraĵoj. Spritaj demandoj	16
Isja Oljanova. Mi partoprenis la Infanan Kongreseton	III
* * * Eldiroj pri la Infanasembleo okazinta en Sofio	IV
* * * Forpasis Nikola Miĥajlov	IV

Sur la kovrilpaĝoj:

D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ, NASKITAJ EN DECEMBRO

Malbone estas, ke la plej grandajn suferojn travivas la patrinoj.

Cvetan Spasov, poeto-partizano (10. XII. 1919 — 14. II. 1944)

La verkisto influas la popolon ne nur per sia verkaro, sed ankaŭ per sia persona vivo.
Nikolaj Ĥrelkov poeto (26. XII. 1894 — 26. VIII. 1950)

Antaŭ ĉio ni devas esti homoj, kaj jam poste bulgaroj kaj patriotoj.

La bulgaria popolo ne estas en la tombo de sia pasinteco, sed en la lulilo de sia estonteco.
Rusio neniam rezignos nin kaj neniam ĝi permesos, ke aliaj nacioj tretu la slavan nomon
Ĥristo Botev, poeto-revoluciulo (25. XII. 1848 — 20. V. 1876)

La vivo ja venos pli bela ol kanto, pli bela ol printempa tag'...

Nikola Vapcarov, poeto (28. XII. 1909 — 23. VII. 1942)

Elektis kaj tradukis: Stojan Kostadinov

**120 JAROJ EKDE LA NASKIĜO DE D-RO L. L. ZAMENHOF**

En decembro ĉi-jare la monda esperantistaro solene celebras la rondan datrevenon de la naskiĝo de la amata aŭtoro de Esperanto — d-ro L. L. Zamenhof. Li estis tiu unika sciencisto, kiu povis ne nur krei talentan projekton de lingvo internacia, sed ankaŭ enspiri en ĝin vivon, kreante movadon por ĝia subteno kaj disvastigo, por ĝia transformiĝo en vivantan, vere internacian lingvon. Ja centoj da talentaj homoj en daŭro de kelkaj jarcentoj faris diversajn, iufoje tre originalajn projektojn de lingvo internacia. Ili tamen ne sukcesis krei subtenan movadon.

D-ro Zamenhof publikigis sian lingvon en momento, kiam la publiko post la fiasko de Volapuko ĝenerale malreviĝis pri la ideo de lingvo internacia. Sed li estis homo kapabla entuziasmigi siajn adeptojn. Ĉirkaŭ li kolektiĝis anaro da pioniroj, pretaj subteni lin sur la nekonata kaj malfacila vojo. Ili ĉiuj, frunte kun Zamenhof, ne atendis baldaŭan venkon, sed posedis sufiĉe da energio, kuraĝo kaj fido por ekiri „la vojon celitan“.

Jam pasis pli ol naŭdek jaroj depost la komenciĝo de la E-movado. Baldaŭ ĝi celebros sian centjaran jubileon. Por la homo centjara jubileo estas elokventa signalo pri maljuniĝo. Ne tiel staras la afero en la sfero de la homaj ideoj. Iuj geniaj ideoj de grekaj kaj aliaj antikvaj eminentuloj devis atendi milojn da jaroj ĝis venis la momento de ties vastskala realiĝo. Ankaŭ la pli nova historio de la socio kaj de la scienco donas abundajn ekzemplojn pri tio.

La internacia lingvo E-o ĉiujare registras novajn atingaĵojn. Plivastiĝas la rondo de internaciaj kaj interŝtataj institucioj, rekonantaj ĝian valoron. Laŭgrade maturiĝas la objektivaj kondiĉoj por ĝia aprobo kiel unu el la lingvoj, uzataj en la internaciaj rilatoj.

Ne subtaksante la realajn obstaklojn antaŭ tiu aprobo, ne supertaksante la atingitajn ĝis nun sukcesojn, la esperantistaro devas daŭrigi sian celkonscian agadon tiurilate. Energie kaj pacience ni laboru en la spirito de la fama slogano, starigita de Teofil Kar: „Ni ĵosu nian sulkon!“ Venos momento, kiam plene maturiĝos la politikaj kaj sociaj cirkonstancoj por organizo de aŭtoritata kaj decidopova interŝtata forumo pri la problemo de internacia lingvo. Antaŭ tiu forumo la internacia E-movado prezentos brilajn pruvojn pri la sukcesa aplikado de E-o en ĉiuj sferoj de la homa agado.

D-ro Zamenhof testamentis al ni sian senfinan kuraĝon, sian neelĉerpeblan energion kaj entuziasmon:

*Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas —
ni semas kaj semas konstante.*

Ni restas sur tiu optimisma pozicio kun la kredo, ke jam ne estas malproksima la tempo, kiam la homaro turnos la necesan atenton al pli fundamentaj socikulturaj problemoj, inter kiuj ankaŭ al la problemo de lingvo

A L L A F R A T O J

Forte ni staru, fratoj amataj,
Por nia sankta afero!
Ni bataladu kune tenataj
Per unu bela espero!

Regas ankoraŭ nokto sen luno,
La mondo dormas obstine,
Sed jam leviĝos baldaŭ la suno,
Por lumi, brili senfine.

Tre malproksime ĉiuj ni staras
La unu de la alia. . .
Kie vi estas, kion vi faras,
Ho karaj fratoj vi miaj?

Vi en la urbo, vi en urbeto,
En la malgranda vilaĝo,
Ĉu ne forflugis kiel bloveto
La tuta via kuraĝo?

Ĉu vi sukcese en via loko
Kondukas nian aferon,
Aŭ eksilentis jam via voko,
Vi lacaj perdis esperon?

Forte ni staru, brave laboru
Kuraĝe, ho nia rondo:
Nia afero kresku kaj floru
Per ni en tuta la mondo!

Staras ankoraŭ en la komenco
La celo en malproksimo, —
Ni ĝin atingos per la potenco
De nia forta animo!

Ni ĝin atingos per la potenco
De nia sankta fervoro,
Ni ĝin atingos per pacienco
Kaj per sentima laboro.

Gloru la celo, sankta l'afero,
La venko — baldaŭ ĝi venos;
Levos la kapon ni kun fiero,
La mondo ĝoje nin benos.

Tiam atendas nin rekompenco
La plej majesta kaj riĉa:
Nia laboro kaj pacienco
La mondon faros feliĉa!

' Ellasitaj 5 strofoj.

(El paĝo 1)

internacia. Espereble, tio okazos, kiam la homaro per la potenco de la socialisma ŝtataro kaj la monda movado de pacdefendantoj savos la mondon kontraŭ la ŝvebanta nun imperiisma minaco de nuklea katastrofo. Tiam antaŭ ĉiuj popoloj de la terglobo malfermiĝos novaj vojoj al plua disfloro de la homa kulturo kaj civilizo, kies esencan parton prezentas ankaŭ la internacia lingvo.

En Bulgario la esperantista movado havas longan kaj riĉan historion. Fine de la 19a jc. en la ĵus liberiginta el sub kvinentjara fremda jugo malgranda, malriĉa kaj preskaŭ analfabeta Bulgario troviĝis manpleno da homoj, kiuj arde kaj sindone brakumis la verkon de d-ro Zamenhof. Ili lernis E-on laŭ lia lernolibro por rusoj, sed baldaŭ preparis kaj eldonis lernolibrojn kaj vortarojn de E-o por bulgaroj.

En oktobro 1889 oni fondis la unuan E-societon en nia lando, kiu subtenis skribajn rilatojn kun d-ro Zamenhof. Surbaze de kelkdekoj da E-societoj aperintaj diversloke, en 1907 j. oni fondis ankaŭ nacian E-organizaĵon.

La nunaj generacioj de bulgaraj e-istoj fieras, ke iliaj antaŭuloj estis inter la kunbatalantoj de Zamenhof kaj ardaĵ pioniroj de E-o. Al ili — nian ĉiaman rekonon kaj estimon!

En la antaŭvespero de nia 40a landa E-kongreso — per duobligitaj fortoj al novaj sukcesoj de la bulgara taĉmento de la internacia E-movado! La riĉaj rezultoj de nia abnegacia laboro prezentos la plej bonan manieron por celebri de la rimarkinda 120a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof.



La antaŭkongresa konkurado inter la E-societoj vigliĝas kaj donas puŝojn al la diverskampa societa aktiveco. Ĉi tie ni publikigas la unuajn rezultojn. Ni bone konscias, ke la bildo ne estas plena. Ne ĉiuj societoj sendis ĝis nun informojn. Ne ĉiuj ricevitaĵoj informoj estas plenaj. Ankoraŭ estas frue raportoj pri kelkaj agadsferoj (abonigo al „Bulgara Esperantisto“ kaj „Paco“, E-kursoj).

Nia bilanco limiĝas ĝis la 20-a de novembro. Duan bilancon ni donas en la februara numero de la revuo. Tiam ni informos ankaŭ pri la konkurado inter la sekcioj, Ne prokrastu viajn tujajn informojn pri ĉia aktiveco, indicita en la konkuradkondiĉoj!

Unua konkurgrupo

(La E-societoj en la distriktaj urboj plus 5 s-etoj en aliaj urboj)

Loko laŭ	Loĝloko	Societo	Poen- toj
1.	Ruse	„Libero“	89
2.	Jambol	„Maksim Gorki“	65
3.	Sofia	„Maksim Gorki“	64
4.	Trojan	„Balkana Stelo“	58.5
5.	Kubrat	„Progreso“	43
6.	Kazanlâk	„Roza Valo“	35
7.	Ŝumen	„Vekiĝo“	33.5
8.	Pazarĝik	„Radio“	22
9.	Varna	„Albatroso“	15
10.	Burgas	„Nigra Maro“	14
11—12.	Kjustendil Târgoviște	„Flamo“	13
		„Verda eskadrono“	13
13.	Stara Zagora	„Verda Stelo“	11.5
14—15.	Haskovo	„Asen Zlatarov“	8
	Pleven	„Mondpaco“	8
16.	Gâlâbovo	„Kolombo de la Paco“	6.5
17.	Vraca	„Sukceso“	5
18.	Veliko	„Lumo“	4
	Târnovo	„Verda Torĉo“	3
18—20	Gabrovo	„Espero“	3
	Loveĉ	„Kulturo“	3
	Plovdiv	„Kulturo“	1
21.	Smoljan	„Kulturo“	1

Dua konkurgrupo

(En la aliaj lokaj kaj laŭ profesio E-societoj)

1.	Velinograd	„Stoju Kalpazanov“	297
2.	Polski	„Progreso“	25
3.	Trâmbeŝ	„D-ro L. L. Zamenhof“ — me-	
	Sofia	dicinista	18
4—5.	Samokov	„Rila Esperantisto“	8
	Sofio	„Heroldo“ (poŝtista)	8
6—7.	Dospat	„Fajrero“	6
	Popovo	„Homeco“	6
8.	Sofia	„Diĉo Petrov“ — instruista	4.5

9.	Drjanovo	„Ivan Vladkov“	4
10—13.	v. Dâlboki	„Marko Ivanov“	3
	Karlovo	„Vasil Levski“	3
	Ruse	„Ponto de la Amikeco“ — transportista	3
	Svoĝe	„Amikeco“	3
14—15.	Sofio	„Hristo Botev“ (fervoĵista)	2
	Sofia	„Progreso“ — ferroĵista	2
16—21.	Berkovica	„Verda Stelo“	1
	Ĉepelare	„Diĉo Petrov“	1
	Gorna Orja-		
	ĥovica	„Fervoĵista Impeto“	1
	Madan	„Bjalistok“	1
	Marica	„Trakia Lumo“	1
	Stanke		
	Dimitrov	„Marek“	1
21.	Orjaĥovo	„Georgi Stanev“	0.5

Tria konkurgrupo

(Studentaj, junularaj, lernantaj E. Societoj kaj grupoj)

1.	Vidin	Junulara grupo ĉe s-to „Espero“	18
2.	Sofia	„Vasil Levski“ — junulara	16
3.	Sofia	„Vela Peeva“ — studenta	10
4—5.	Smoljan	„Flugo — studenta	2
	Vraca	„Verda Raketo“ — Lerneĵana	2
6.	Veliko Târ-	„Flamo“ — studenta	1
	novo		

Kvara konkurgrupo

(Uzinaj kaj oficejaj E.-societoj)

1.	Ŝumen	„Prospero“ — uzina	9
2.	Sofia	„48-a Universala Kongreso“ — uzina	5
3.	Varna	„Fajrero“ — oficeja	4

Je la 10—11a de novembro la bela kaj gastama urbo Kjustendil fariĝis scenejo de renkontiĝo de e-istoj el Okcidenta Bulgario. La renkontiĝo estis organizita de la Bulgara MEM-Komitato per la efika kunlaboro de la DE de BEA, la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto kaj la Distrikta Pacdefenda Komitato en Kjustendil. Ĝin partoprenis pli ol 100 e-istoj el Sofio kaj el la distriktoj Vraca, Blagoevgrad, Kjustendil, Pernik, Pazarĝik, Sofio ka.

La programo etis tre riĉa kaj varia.

Sabate posttagmeze la gastoj havis la plezuron viziti „La ĝardeneton de la Paco“ en la piedoj de la monteto „Hisarlâka“. La kreinto de la ĝardeneto — la veterano-e-isto Jordan Guglev — bonvenigis la gastojn. Li rakontis, kiamaniere al li venis la ideo fari tiun ĝardeneton, en kiu antaŭ kelkaj jaroj en la ĉeesto de e-istoj el diversaj landoj okazis simbola bruligo de militarmiloj. Poste la gastoj faris agrablan promenadon en la natura parko „Hisarlâka“, kie vidiĝas restaĵoj de romia fortikaĵo el III—IV jc.

Ĉefa programero de la renkontiĝo estis la solena publika kunveno, kiu okazis en la Junulara Domo. Ĝin ĉeestis pli ol 200 pacbatalantoj — e-istoj kaj civitanoj de la urbo. La kunveno komenciĝis per riĉa artprogramo, plenumita de la vokalgrupo „Steleto“ el la urbo kaj la fondita antaŭ nelonge vokala trio ĉe E-societo „Stoju Kalpazanov“ en Velingrad. Malfermajn vortojn diris Metodi Popov — vicprezidanto de la DE de BEA. Prezidis la kunvenon Kiril Nikolov — prezidanto de la DK de Patrolanda Fronto. Salutojn prezentis Elka Taneva — sekretario de DK de Komsomolo. Ĉefa oratoro estis Nikola Aleksiev — honora prezidanto de MEM. Li parolis pri la danĝeroj pro la vetarmado, pri la plej novaj proponoj de Sovetunio pri malmuntigo de la armiloj, pri la laboro kaj batalo de la bulgara popolo kaj de bulgaraj e-istoj por paco kaj internacia amikeco. La kunveno unuanime akceptis telegramon al la Monda

Packonsilio, en kiu oni kondamnas la klopodojn de la agresemaj fortoj de la imperiismo haltigi la procezon de sereniĝo en la mondo.

Antaŭ la kunveno estis aranĝita ekspozicio de pentristoj amatoroj el la urbo — inĝ. Nadeŝda Bojaĝijska kaj Svetozar Matev.

Post la kunveno okazis komuna vespermanĝo kaj amuzado.

Dimanĉe antaŭtagmeze la partoprenantoj en la renkontiĝo vizitis la domon-muzeon de la pereinta en la kontraŭfaŝisma batalo Dimitro Kaljaŝki en la proksima vilaĝo Jilenci. Georgi Kaljaŝki, lia pli juna frato, nun prezidanto de la DE de BEA, rakontis detale pri la vivo kaj batalo de tiu fidela popola filo, sentima revoluciulo kaj tribunuso, homo de proverba laborkapablo kaj granda modesteco, eksterordinare naturdotita kaj harmonie disvolviĝinta personeco, kiu estis ĵurnalisto, redaktoro, tradukisto, aŭtoro, stenografo, poligloto (rusa, franca, germana, hispana kaj Esperanto), arda e-isto kaj granda humanisto. Rememorojn pri la heroo rakontis ankaŭ liaj amikoj N. Aleksiev kaj d-ro Al. Anev (el Samokov).

Poste oni vizitis la artgalerion „Vladimir Dimitrov — la Majstro“, kie pri la granda bulgara pentristo rakontis rememorojn N. Aleksiev, Boris Petrov kaj N. Bojaĝijska.

La lasta aranĝo en la renkontiĝo en Kjustendil estis MEM-konferenco. Ĝin malfermis kaj gvidis N. Aleksiev. Raporton pri la antaŭstarantaj taskoj de la bulgaraj MEM-anoj faris Dimitro Ĥaĝiev — prezidanto de la Bulgara MEM-Komitato. Li substrekiis, ke plej granda tasko de la bulgaraj e-istoj estas diskonigi eksterlande la pacan politikon de nia lando kaj de la ceteraj landoj de la socialisma komunaj. Sekvis vigla diskutado.

Krom la grava impulso, kiun donis la E-renkontiĝo en Kjustendil, ĝi montris ankaŭ, kiom bonajn rezultojn oni povas atingi, se oni laboras kune kun la aliaj sociorganizaĵoj.

D. Ĥaĝiev

KORAN DANKON!

Ne havante etlecon respondi persone al la gratuloj kaj bondeziroj, ricevitaj de esperantistaj kaj neesperantistaj organizaĵoj kaj individuoj lige kun mia 70-jariĝo kaj distingo per la plej alta honortitolo de la bulgara ŝtato — „Heroo de la socialisma laboro“ kun ora stelo, mi transdonas per la asocia organo miajn plej korajn dankojn al ĉiuj salutintoj.

NIKOLA ALEKSIEV,
Honora Prezidanto de MEM,
membro de la Monda Packonsilio



NASKIĜIS LA UNUA INFANA ESPERANTO-TEATRO

Ĉe la Junpionira Domo en Burgas jam delonge ekzistas infana dramrondo. En septembro 1977 ĝian gvidadon prenis Dimitro Elenov — aktoro de la Ŝtata Dramteatro „Adriana Budevskaja“ en la sama urbo. Kun sia rondo li pretigis por prezento dramitajn fabelojn de Andersen sub la titolo „Fabeloj por infanoj kaj plenaĝuloj“. Per tiu ĉi spektaklo la rondo sin prezentis en konkurso, kie la gvidanto kaj parto de la infanoj estis dekoritaj per 8 oraj medaloj kaj la ceteraj infanoj per 13 arĝentaj. La prezidanto de la ĵurio — la Merita Aganto de la Kulturo Angel Vâlcanov — proponis, kaj oni enskribis en la protokolo de la ĵurio, ke la spektaklo posedas profesiajn teatrajn ecojn, do oni proponas al la teatro „A. Budevskaja“ akcepti, ke ĝi estu prezentata sur profesia scenejo. La teatro akceptis la proponon kaj la spektaklo estis enskribita en ĝia repertuaro. Ekde aprilo 1978 oni jam prezentas ĝin kiel regulan. Kaj la drama rondo transformiĝis en dramstudion ĉe la teatro. Ĝis nun oni prezentis 26 spektaklojn, el kiuj 21 en Burgas kaj 5 en la pli grandaj urboj de la distrikto.

Oni jam pretigis kaj en proksima tempo prezentos novan teatraĵon. Post tio oni projektas labori sur tria teatraĵo, kiu estos jpefa eble en la unuaj monatoj de la venonta raro.

En marto lige kun la Internacia Jaro de Infano la malgrandaj artistoj decidis lerni E-on, kaj tuj post tio venis la decido prepari la saman teatraĵon en E-o.

Dirite — farite. Oni tuj komencis seriozan laboron. Dum aprilo — junio la infanoj aktive lernis E-on. En julio ili pasigis en Pollando du semajnojn en somera tendaro, post la reveno — du semajnojn en Druĵevo. Tie estas organizata tiujare somera Esperanta tendarlernejo. En tiu „angulo de Esperantujo“ la naturo estas neordinare agrabla, precipe pro sia sovaĝa beleco malofte trovebla en ripozlokoj. La tendaro troviĝas en la Balkano, malproksime de Sofio.


Druĵevo renkontis nin per pluveto. Sed la posta tago estis suna. Kaj... ni komencis. La unuan semajnon ni pli emfazis sur la kursa programo. La kurso, komencita en Burgas, daŭris ĉi tie. Ni legis, skribis, kopiis, desegnis kaj kantis. Vere multe ni kantis — por dekdu tagoj ni ellernis ĉirkaŭ dudek kantojn. La posttagmezoj estis dediĉitaj al laboro super la teatraĵo. Oni enskribis la tekston en kajeroj, legis ĝin laŭtvoĉe kaj hore. Poste ĉiu rolulo devis parkerigi la tekston de sia rolo. Ni serioze laboris. Por tio helpis ankaŭ la malbona vetero — preskaŭ la tutan semajnon pluvegis. Tuttage kaj ĝis malfrua nokto ni laboris en la klasĉambro. La infanoj —

kaj kiaj infanoj! Lernemaj, entuziasmaj, kun belaj koroj kaj animoj — fajron ili portas en la brustoj, ne nur sunajn korojn! La infanoj ŝatis la laboron — ĉiun laboron, ĉiuspecan, ĉion ligitan kun E-o ili faris kun ĝojo! Ili ne laciĝis. Eĉ kiam la gvidanto proponadis ĉesi, la plimulto, se ne ĉiuj, insistis: ankoraŭ, ankoraŭ! „Nu bone — cedis la gvidanto, — sed nur ankoraŭ dek minutojn — por fini la scenon...“

Sed venis la dua semajno. La suno aperis, kaj ni eliris el la klasĉambro. La belaj suntagoj disponigis al ni la herbejon — natura vasta scenejo, kie ni povis libere moviĝi, paroli plenvoĉe, danci, kanti... Kaj la junaj geaktoroj — plej belaj floroj de tiu floranta kaj kantanta naturo. Ili ludis el tuta sia koro. En la vortoj de sia rolo ili enmetis sian tutan belan infananimon kaj sian admiron al la lingvo. „Multe pli bone sonas nia teatraĵo en E-o!“ — diradis multaj el ili kun brilantaj okuloj. „Estas vera plezuro paroli kaj ludi en E-o!“ — aldonadis aliaj. Promenante sur la herbejo kaj grimpante sur la montetoj ili lernis altvoĉe siajn rolojn, samkiel ili lernas ĉiun novan rolon, kun amo al tiu nova mirinda lingvo E-o! Ni preparis ankaŭ malgrandan programon por la sofiaj e-istoj.

Pasis la du semajnoj kaj ni alveturis Sofion. Tie, en la klubejo de la urba E-societo „M. Gorkij“, sur tute nekonvena scenejo, la infanoj ludis, kantis. Sed ili faris tion plenkore, entuziasme. Pro tio ili gajnis la korojn de sia publiko kaj ricevis grandan simpatian, multajn aplaŭdojn, gratulojn kaj laŭdojn pro sia bela elparolo kaj ludo. La infanoj bonege pasis la unuan ekzamenon antaŭ E-publiko kaj ili estis feliĉaj! La sofia distrikta estraro donis al ili festan vespermanĝon en restoracio. Tie ili denove deklamis, kantis, multe kaj elkore ri-

Provekzercoj en Druĵevo. Dekstre staras la gvidanto Dimitro Elenov.



dis — kiel infanoj... La sekretario de CE de BEA kaj ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“ Kunĉo Vâlev per varmaj kaj entuziasmaj vortoj salutis la infanojn. Li bondeziris al ili grandajn sukcesojn en ilia aktora laboro, ke ili multfoje prezentu sian teatraĵon antaŭ E-publiko unue en la lando kaj poste ankaŭ eksterlande. Li diris, ke la bulgaraj e-istoj havos grandan plezuron vidi ilin en sia 40-a jubilea kongreso en Plovdiv en 1980 j.

Post dektaga ripozo en Burgas komenciĝis laboro por prepari la duan parton de la teatraĵo. Je la fino de septembro la tuta E-lingva teatraĵo jam estis pretaj kaj ĝi aperis sur teatra scenejo.

Por la unua spektaklo oni invitis reprezentantojn de CE de BEA. Venis k-do Nikola Aleksiev. Li ĉeestis la spektaklon dufoje: matene oni prezentis ĝin bulgarlingve por la infanoj de laboristoj kaj oficistoj de Nefto-Kombinumo, kaj posttagmeze — en E-o por E-publiko, en kiu enmiksiĝis ankaŭ gepatroj kaj parencoj de la junaj aktoroj.

Je la fino de la spektaklo okazis mallonga solenaĵo, en kiu oni anoncis la kreon de la Unua Infana E-Teatro en la mondo. Ĉiu novnaskito ricevas nomon, do oni invitis k-don Aleksiev estiĝi baptopatro de la nova teatro. Li akceptis la inviton kaj donis al ĝi la nomon de d-ro Zamenhof. Per bela parolado li salutis la malgrandajn aktorojn pro ilia entuziasma ludo kaj bela elparolo. Salutante ankaŭ la gvidanton kaj reĝisoron de la nova teatro — Dimitro Elenov, li aparte emfazis, ke estas videble, kia granda laboro estas farita kaj de la gvidantoj, kaj de la infanoj por atingi tian nivelon.

Li anoncis speciale, ke la nova teatro estas grava iniciato okaze de la Internacia Jaro de Infano.

Ni bondeziras al la bonegaj, entuziasmaj junaj aktoroj radii tra la tuta lando kaj tra la mondo sian entuziasmon kaj pruvi efektive, kiel bela, kiel belsona, kiel vivanta kaj eleganta lingvo estas E-o.

Bonŝancon, karegaj infanoj!

M. E.

MEDICINISTA ESPERANTISTA SOCIETO EN SOFIO

En januaro 1979 en Sofio fondiĝis medicinista E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“. Ĝi ekfunkciis sub la gvido de jena estraro: prof. d-ro Kiril Popov — prezidanto, d-ro Kânĉo Kânĉev — vicprezidanto, Sijka Kravaeva — sekretario, d-ro Cveta Stamenova — respondeca pri la kursoj, kaj Ĝunka Zaharieva — kasistino. Dum sia jam unujara agado la societo sukcesis unuigi en siaj vicoj ĉ. 80 medicinistojn. Ĝi havas la taskon membrigi ĉiujn e-istojn, kiuj laboras sur la kampo de la sanprotekto en Sofio — kuracistoj, stomatologoj, akuŝistinoj, vickuracistoj, veterinaroj, apotekistoj, hospitalaj laborantinoj ka. Ĝia ĉefa celo estas disvastigi E-on inter la medicinistoj, por ke ili uzu ĝin en sia profesia laboro kaj civitana vivo, por kontakti kun kolegoj el la tuta mondo, interŝanĝi spertojn, fakajn kaj ĝeneralajn novaĵojn, popularigi en eksterlando la sukcesojn de la bulgara medicina scienco kaj sanprotekto ktp.

La societanoj kunvenas ĉiumonate en la Centra Domo de Medicinistoj, kies estaro tre favoras E-on. Unua notinda societa aktiveco estas la multnombra partopreno en la ĉijara Dua Medicinista Renkontiĝo en Hungario. La semajna medicinista ĵurnalo „Zdraven front“ (Sanprotekta Fronto) aperigis artikolon de la prezidanto prof. d-ro Popov.

La societo forte deziras kontaktojn kun medicinistoj el ĉiuj landoj. Ni petas ilin skribi al jena adreso:

Bulgara Esperantista Asocio. Medicinista Sekcio, bul. Ĥr. Botev 97, 1303 Sofio

Esperanto en ĝenerala ekspozicio

La kutima aktuala monata ekspozicio de la Muzeo de Revolucia Movado en Sofio por monato novembro ĉi-jare estis dediĉita al la 60-jara jubileo de la organizaĵo de BKP en u. Kârĝali. En ĝi estis ankaŭ E-eksponaĵo — foto de grupo da e-istoj de 1919 j. Detala teksto klarigas la progresman karakteron de la tiama loka E-societo „Verda Stelo“, fondita en 1915 j.

KUNVENO PRI GDR

La e-istoj de Ŝumen solene celebris la 30-an datrevenon de la fondiĝo de GDR — la unua vere demokratia germana ŝtato. Frue ili sendis gratulleteron al E-societoj „Progreso“ kaj al la unuigo de Kulturagantoj en u. Magdeburg, kun kiu Ŝumen estas interfratiginta kaj la e-istoj el ambaŭ urboj havas kontrakton pri kunlaboro kaj reciprokahelpo.

Amase la e-istoj de Ŝumen dissendis leterojn al siaj germanaj amikoj.

En Ŝumen okazis kunveno, dediĉita al GDR. Pri la ĉiuflanka evoluo de la unua germana socialisma ŝtato prelegis d-ro Ĵelez Tonev. Post la prelego oni recitis poemojn de la elstaraj germanaj verkistoj Johanes Beĥer kaj Ludvig Ren. Unuanime oni akceptis telegramon al la konsulejo de GDR en u. Varno.

Cvjatko Todorov



ĈIAM PLI SUKCESA ESPERANTA TENDARLERNEJO APUD DRUĴEVO

La Esperanta tendarlernejo apud Druĵevo en pitoreska Balkano ĉi-jare notis sian plej grandan sukceson. La preparlaboroj komenciĝis frue. Du brigadojn formis la sofiaj e-istoj, por finpurigi kaj aranĝi ĉion, por ornamo la ejojn, finpretigi aleojn, la ĝardenon ktp. La brigadoj faris ege utilan laboron helpe al la klopodoj de la Sofia Distrikta Estraro de BEA kaj de Bulgara E-Kooperativo aranĝi ĉiam pli kaj pli bone la tendarlernejon.

La loĝkondiĉoj estis sufiĉe bonaj. La infanoj loĝas po kvar en bongalo, funkcias la banejo.

Dum la tuta tempo de la 3 de junio ĝis la 14 de septembro en la tendarlernejo sonis E-paroloj kaj kantoj. Sinsekve po 14 tagoj ĉi tie loĝis kaj lernis E-on grupoj el: Pleven — infanoj kun kursgvidanto Velka Dobrev, Sofia — 29 infanoj kun gv. Miĥail Elenov, miksitaj grupo el diversaj lokoj — 22 infanoj — gv. Simeon Hesapĉiev, el Kazanlâk — 27 infanoj, gv. Penka Miĥajlova, el Sofio — 16 infanoj, gv. Ljuben Grozdanov, el Burgas — 32 infanoj, gv. Miĥail Elenov. La lasta grupo (1—14 de septembro) konsistis el plenaĝuloj el Sofio, kursgvidanto d-ro Stojan Moraresku. Entute 170 personoj — per 50 pli kompare kun la plej sukcesa jaro 1977, kiam la tendarlernejon parteprenis 120 personoj.

Preskaŭ en ĉiu grupo krom la ĉiutaga trihora lernado de E-o estis organizitaj vesperoj de la humuro, de la talentoj, tendarfajroj, ekskursoj al interesaj lokoj —

montopintoj Garvanec, Sokolec, la loko, kie trapasis la taĉmento de Panajot Hitov kun la juna standardportanto Vasil Levski, estis aranĝitaj ekspozicio de pentraĵoj de la infanoj mem ktp. Aparte notinda estis la grupo el Burgas. La infanoj sub la gvido de aktoro Dimitro Elenov preparis teatraĵon el la fabeloj de Andersen. Tiuj ĉarmaj infanoj ĉiam kantis, legis, lingvoekzercis, pentris ktp. En la manĝejo ili aranĝis ekspozicion de propraj pentraĵoj pri la herooj de la preparata teatraĵo. Fine ili prezentis riĉan belartan programon. La programon ĉeestis invitite reprezentantoj de la aŭtoritato kaj la socio el Druĵevo. Ĉiuj estis ravitaj. Revene la infanoj manifestis sian talenton ankaŭ en Sofio, prezentante fragmenton de sia teatraĵo kaj alian belartan programon antaŭ la sofiaj e-istoj. Tiu grupo estas la bazo de la unua en la mondo E-teatro, plene merita porti tiun nomon.

En la tendarlernejo en diversaj momentoj gastis ge-istoj: dufoje grupo el Svoge sub la gvido de k-ino Elena Radenkova, la aktora familio Belka Beleva kaj Anani Anev, aliaj sofiaj e-istoj.

La organizantoj de la tendarlernejo apud Druĵevo havas la noblan ambicion venontjare ankoraŭ pli bone aranĝi ĉion, fari novan paŝon al plilarĝigo kaj tutece pli-bonigo de tiu bazo de bulgara E-movado, kiu fariĝos ŝatata loko por lernado de E-o kaj por ripozo de etuloj kaj plenaĝuloj.

Nikola Mladenov

LA LERNOJARO EN POLSKI TRAMBEŜ

La e-istoj en u. Polski Trambesĥ komencis la novan lernojaron per urba kunveno. Ĝin malfermis k-dino Donka Velikova, membro de la Komunuma Komitato de BKP. Ŝi substrekiis la laŭdindan aktivecon de la loka E-societo „Progreso“, ĝiajn vastajn internaciajn kontaktojn, la simpatiojn de la loka civitanaro al la nobla agado de la e-istoj.

La prezidanto de la societo, k-do Ĥristo Manolov, faris paroladon pri la nunaj atingoj de la E-movado sur enlanda kaj internacia tereno kaj pri la antaŭstarantaj taskoj lige kun la jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj en Plovdiv.

Ĝis nun komencis laboron jenaj kursoj: 1 por lernantoj kun 23 partoprenantoj kaj du urbaj kun 35 civitanoj. Ĝojiga fakto estas, ke la plejmulto de la novaj kursanoj estas komsomolanoj. Jam 6 personoj el la geinstruistoj en la loka gimnazio estas e-istoj. Substrekinda estas la granda apogo de nia laboro fare de la gimnazia gvidantaro, ĉefrunte kun la direktoro Ivan Gaĝulov.

Valentin Angelov

La infanoj el Pleven en Druĵevo



Intervjuo kun s-ano ANANI ANEV — artisto
el la Muzikteatro „Stefan Makedonski“ —
Sofio

Demando: *Kamarado Anev, kion vi povas dividi kun la legantoj de «Bulgara Esperantisto» pri la laboro de la 64a UK de E-o en Lucerno kaj antaŭ ĉio pri la partopreno de la Bulgara E-teatro en ĝia kultura programo?*

Respondo: Jam en la komenco de nia interparolo mi ne povas nefari unu komparon de la Kongreso en Lucerno kun la pasintjara Kongreso en Varno. Ĝi ne estis tiel impona, sed konserviĝis la reprezentanteco — partoprenis ĝin 1635 kongresanoj el 49 landoj. Apartan impreson faris al ni ĝia bona organizo. Oni ĝuste povas diri, ke dank' al la energia kaj kompetenta gvidado de LKK en la personecoj de Kurt Grojtert, Carlz Pauer kaj ties kunlaborantoj estis efektivigita bona krea atmosfero por la diversaj aranĝoj. Tiuj aranĝoj vere estis multaj, kaj ĉiu kongresano devis elekti laŭ siaj personaj ŝatoj kaj intereso.

Mi ekzemple kun granda intereso sekvis la laboron de la internacia Somera Universitato, enkadre de kiu specialistoj prelegis je alta scienca nivelo pri diversaj temoj. Aparte mi deziras substreki, ke la koncertoj de niaj bulgaraj kantistoj Veselin Damjanov, Galja Kostova kaj Prodan Prodanov havis tre bonan sukceson kaj la publiko varme aplaudis ilin.

Rilate la duan parton de la demando mi dezirus diri, ke nia grupo de la Bulgara E-Teatro en konsisto Stefka Prohaskova — popola artistino, reĝisorino, kaj Belka Beleva, Anani Anev, Veselin Damjanov kaj Prodan Prodanov — artistoj, preparis la teatraĵon „Amo“ de la franca aŭtoro Pol Ĵeraldi. Mi opinias, ke ni sukcesis prezenti ĝin je alta profesia nivelo, plenumante bone la ideojn de la verkisto. Pri tio parolas la fakto, ke ambaŭ spektakloj, kiujn

Prepare al la spektaklo. Sidas de dekstre: A. Anev, St. Prohaskova, B. Beleva, V. Damjanov. Staras Pr. Prodanov.



ni faris, ĝuis plenan salonon de „Kunsthaus“, kaj la publiko aparte varme aplaudis nin. Tiu sukceso estis substrekita ankaŭ de prof. Tonkin, la prezidanto de UEA, en liaj gratulvortoj, kaj de la kongresa informa bulteno „Kuriero“, kiu aparte emfazis la ĝustan, klaran kaj kompreneblan por ĉiu spektanto prononcado de la aktoroj. Tre pozitivan pritakson donis ankaŭ s-ro Kurt Grojtert. La sukcesa prezento de nia malgranda kolektivo estis kaŭzo, ke oni denove ekparolu pri la teatra arto de nia socialisma patrolando kaj pri la sukcesoj de la bulgara E-movado.

S

Demando: *Por ni estus interese aŭdi vian opinion, kiaj problemoj de profesia karaktero aperas nun, kaj kion oni devas fari por ties urĝa kaj sukcesa solvo.*

Respondo: Por ni, kiel aktoroj, ĉefa problemoj kaj konstanta tasko restas la ekposedo kaj perfektigo de la parolata E-o. Tiu postulo ĉefas por ĉiu aktoro, ĉar la lingvo estas la esprimrimedo de lia arto. Ĉi tie la problemoj estas ne la mekanika parkerado de aparta repliko, de aparta teksto, sed la tuteca regado kaj aplikado de la riĉeco de la lingvo parolata. Tio postulas konstantajn kaj senperajn ligojn de la aktoroj-e-istoj kun la E-movado. En tiu direkto oni devas serĉi formojn de pluaj kaj ĉiam pli intimaj kontaktoj.

Due aperas la problemoj pri la spektakloj mem. Estas konata la fakto, ke la preparo de teatra spektaklo en fremda lingvo, inkluzive en E-o, postulas longan tempon, multan laboron, kreaĵon streĉon, materialan sekurecon rilate rimedojn, rekviziton kaj. Sed post ĉio ĉi ordinare sekvas nur unu aŭ du spektakloj. La aktoroj estas pretaj, ekzistas E-publiko, sed ne estas personoj aŭ organoj, kiu okupiĝu pri organizado de spektakloj. Por efektiviĝi serion da spektakloj evidente estas necesaj ne nur la klopodoj de la aktoroj, sed ankaŭ tiuj de la distriktoj kaj societaj estraroj de BEA. Laŭ mi, necesas komuna kunlaboro por organizi pli da spektakloj — en la ĉefurbo, en la landoj kaj, se eble, ankaŭ en eksterlando.

Alia problemoj, ne malpli grava, estas tiu pri la repertuaro. El propra sperto mi scias, ke oni devas elekti teatraĵojn kun malmultaj roluloj. La malfacilo venas, kiam al tiu konsidero devas respondi la enhavo de la teatraĵo mem. Do la teatraĵo devas esti kaj ĉiurilate konvena laŭ ideoj, kaj kun nemultaj roluloj. Ĝis nun ĉe elekto



de teatraĵo ni ĉiam strebis respondi bone al tiuj du postuloj. Pli granda respondeco ĉe elekto de teatraĵo prezentota antaŭ la internaciaj forumoj de la e-istoj — tio restas nia grava zorgo ankaŭ por la estonto.

Demando : *Vi estas unu el la fondintoj de la Bulgara E-Teatro. Kiel vi vidas ĝian pluan evoluon ?*

Respondo: Estas konate, ke dum sia dudekjara ekzistado BET sukcese prezentigis antaŭ miloj da partoprenantoj en la Universalaj Kongresoj. Ĝiaj spektakloj en Varsovio, Splii, Sofio, Hago, Budapeŝto, Helsinki, Vieno, Londono, Hamburgo, Kopenhago, Ateno, Varno kaj Lucerno estis vere festaj manifestaĵoj de la bulgara teatra arto sur internacia scenejo.

Dum tiu periodo la kolektivo de la artistoj kreskis. En la spektakloj partoprenis elstaraj niaj teatraj kreantoj, kiel la popolaj geartistoj Olga Kirĉeva, Margarita Duparinova, Tanja Masalitinova, Lili Popivanova, Kosta Conev, la meritaj geartistoj Petro Vasilev, Nikola Binev, Vanĉa Dojĉeva, Ĵorĵeta Ĉakârova, Violeta Nikolova ka., la aktoroj-fondintoj de BET — Georgi Kerelezov, Gerasim Mladenov, Belka Beleva, Kostadinka Nedeva, Anani Anev, la geaktoroj Adriana Andreeva, Olga Popova, Miĥail Ĝobanov, Teo Jurukov, Petro Vuĉkov, Veselin Damjanov ka. La surscenigoj estis faritaj de elstaraj reĝisoroj kiel la popola artisto prof. Krâstju Mirski, la meritaj artistoj Stefka Proĥaskova, Mois Benieŝ, Miroslov Mindov ka.

La tradukojn de la prezentitaj teatraĵoj faris niaj kaj eksterlandaj tradukintoj — Miĥail Langov, Kiril Draĵev (16 teatraĵojn), Ujljam Old, Simeon D. Simeonov,

Asen Grigorov, Ivan Tanev, Prodan Prodanov ka.

La manifestaĵoj de BET en eksterlando estis eblaj dank' al la komprenemo kaj granda morala kaj materiala helpo fare de la Komitato de Kulturo. Sian kontribuon ĉiam donis ankaŭ la Bulgara E-Asocio.

Pri la plua evoluo de BET mi povas diri la jenon. Oni devas plivastigi ĝian partoprenon kaj rolon en la vivo de la bulgara E-movado. Ĉe diversaj okazoj kaj solenaĵoj en la ĉefurbo kaj en la tuta lando, enkadre de niaj naciaj E-kongresoj ka. BET povas prezenti tutajn spektaklojn aŭ unuaktaĵojn, dialogojn, recitalojn ktp. La teatro estas aktiva forto por la formiĝo de kultura ĉiuflanke evoluanta personeco. BET helpas kaj devas helpi pli kaj pli por la ekposedo de la internacia lingvo E-o. Aparte gravan rolon BET havas por la propagando de E-o, por altiri la interesojn kaj de la vasta publiko, kaj de aktoroj kaj reĝisoroj al nia afero. Mia opinio estas, ke ĝis nun BET ne estis sufiĉe utiligata por tiuj gravaj taskoj de nia E-movado. Do tio restas farenda.

Popularigante la klasikajn kaj nuntempajn atingojn de la bulgara, soveta kaj progresema okcidentlanda dramaturgio, BET samtempe donas bonan kontribuon al la nobla afero de defendo de la kulturaj valoroj kaj la paco, por la reciproka konatiĝo kaj proksimiĝo de la popoloj en la tuta mondo.

Do evidentas, ke BET estas grava atingo de la Bulgara E-movado kaj oni devas ĝin konservi kaj disvolvi plue dum la sekvaj jaroj.

Interrojis : Dimitro Mutuŝev

REKTORO ESPERANTISTO

En oktobro 1979 kiel rektoro de Universitato «Kiril kaj Metodi», en urbo Vlliko Târnovo estis elektita prof. ANGEL DAVIDOV, kandidato de la filologiaj sciencoj, organizita esperantisto. Preĉipe dank' al lia granda helpo dum multaj jaroj E-o estas instruata fakultative en la Universitato. En tiu altlernejo en la somero de 1978 okazis la 34a kongreso de TEJO.

TITOLITAJ E-LEKTOROJ

Laŭ propono de la Instruista Sekcio la Centra Estraro de BEA aprobis honortitolojn al jenaj E-lektoroj:

ELSTARAJ LEKTOROJ

Kunĉo Vâlev — Sofio
Ĥristo Manolov — Polski Trâmbeŝ
Violin Oljanov — Sofio

REKONITAJ LEKTOROJ

Rajna Kasabova — Ŝumen
Dimitro Canev — Popovo
Kalju Bjandov — Burgas
Djanko Minĉev — Gabrovo

Gratulon al la titolitoj! Sanon, feliĉon kaj novajn sukcesojn en la instruado de Esperanto!

TRA LA SOVETA LANDO

E-AKTIVECO EN LENINGRADO

En marto 1979 estis fondita Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE).

Post la fondiĝo de ASE la E-movado en Leningrado grandskale aktiviĝis. En la lokaj ĵurnaloj „Leningradskaja Pravda“, „Večernij Leningrad“, „Smena“ plurfoje aperis artikoloj pri la historio de la Internacia Lingvo, pri la fondiĝo de ASE kaj de ĝia leningrada filio, pri aktivado de la E-vivo en nia urbo.

En Leningrado estas organizitaj kelkaj E-kluboj en ĝiaj apartaj distriktoj. Inter ili estas ankaŭ klubo por blindaj e-istoj.

En leningrada „Centra lekcio“ de societo „Scio“ antaŭ nelonge ekfunkciis 13-lekcia kurso pri E-o. La temaro de la lekcioj estas sufiĉe vasta kaj enhavas ne nur bazajn sciojn pri la lingvo mem, sed ankaŭ konatigas la aŭskultantojn kun la historio de E-o kaj de ĝia uzado en la plej diversaj sferoj de socia agado. La lekciojn legas konataj leningradaj l-istoj. Ĉiu kursaŭskultanto ricevos E-lernolibron, kiu nun estas presata.

Prof. A. N. Kameškov

Adreso de la Leningrada Filio de ASE:
*Sovetunio, 191011 Leningrad, Fontanka 21,
Domo de Paco kaj Amikeco, Esperanto-Sekcio.*

FORPASIS D-RO V. V. BUTORIN

Fine de oktobro en Novosibirsk (USSR) subite forpasis la veterano de la E-movado en Siberio d-ro V. V. Butorin, 71-jara.

Ekde sia juneco li estis arda adepto de E-o kaj aktiva aganto de la E-movado. La lingvon li lernis en la komenco de la 20-aj jaroj en u. Barnaul sub la gvido de la eminenta E-instruistino V. I. Seriševa.

D-ro Butorin faris multon por la disvastigo de E-o kiel kursgvidanto, propagandanto kaj aparte kiel filatelisto. Lia filatela kolekto enhavas 50 000 poŝtmarkojn. Neforgeseblaj restos la prelegoj de d-ro Butorin pri la filatelo kaj E-o. Ĉiam tre sukcesaj, tiuj prelegoj kontribuis multe por la propagando kaj disvastigo de nia lingvo.

Ni klinas la kapojn antaŭ la hela memoro de nia samideano, amiko kaj pacbatalanto d-ro V. V. Butorin!

Milica Sokolova

E-NOVAĴOJ EL ESTONIO

En la Universitato de Tartu okazis kunveno de la tartuaj e-istoj. Parolis la konata estona e-isto Jan Ojalo. Li estas ankaŭ aŭtoro de „lernolibro de E-o“. Parolis ankaŭ prof. akademiano Paul Ariste, kiu mem estas e-isto.

Tortuaj e-istoj legas kun intereso revuon „Bulgara Esperantisto“.

*

En la ĉefurbo de Estonio, u. Talin, estis aranĝita filatela ekspozicio „Sportfil“. Partoprenis filatelistoj el Talin, Tartu, Moskvo, Leningrado, Riga, Kaunas, Vilnius, Kaliningrado ka.

Aparte interesa estis la kolekto „La sporto en la Bulgara Popola Respubliko“ — aŭtoro V. Ivanov el Riga. La kolekto ricevis medalon.

Elmar Ratassepp

GASTE ĈE ARMENAJ AMIKOJ

Ĉi-jare mi estis feliĉa viziti sovetan Armenion. Belega lando! Lando de suno. Lando de Narekaci kaj Kuĉak, de Haĉaturjan. Preskaŭ sur la tuta teritorio estas disĵetitaj antikvaj konstruaĵoj. Longe la armena popolo estis sub la kalkano de diversaj konkerantoj kaj subpremantoj, sed ĝi ne pereis kaj nun feliĉe kaj libere iras supren kaj antaŭen, man-en-mano kun sia fidela frato kaj defendanto — la rusa popolo.

Bulgaroj kaj armenoj havis tre proksiman sorton. Neforgeseblaj estas ŝipka kaj Sardapat. Kiu foje estis en Eĉmiadzin, Garni, Gegard aŭ sur la bordo de la bluokula Sevano, neniam povas forgesi Armenion. Mi neniam forgesos kaj la landon, kaj la popolon, kaj la gastemajn armenajn e-istojn. Aparte memorebla estas nia gastado en la klubejo de la erevanaj e-istoj. En tiu momento ili celebris la 180an datrevenon de la naskiĝo de Puŝkin. Pri la vivo kaj verkaro de la granda poeto parolis Aruŝan Hovsepjan. Poste oni prezentis fragmenton el „Eŭgeno Onegin“, La 18-jara Gurgen Ĉobanjan tre similis al Puŝkin, kio fortigis la efikon. Imprese ludis ankaŭ R. Balajan (Tatjana) kaj S. Nalbandjan (la vartistino). Gravan meriton por la sukcesa spektaklo havis ankaŭ la juna reĝisoro A. Gukasjan.

Post la spektaklo okazis bankedo kaj balo, dediĉitaj al la amikeco inter la bulgara kaj armena popoloj.

Nedka Petrova



LA KORO NE KREDAS AL MORTO

Al mia patro, limgardisto G. S.
Baskò, pereinta senspure en Be-
sarabio decembron 1941.

Kuŝas soldato en ombro salika.
Trafis lin tie per paf'malamiko.
Dum tuta vivo edzino Ljudmila
edzon atendas kun kor' maltrankvila.

Jam la filino pli aĝas ol patro.
Songe li venas al ŝi, la soldato:
brilas arĝente la haroj en luno,
ŝajnas li ĉiam nur juna, nur juna. . .

Ne estas tombo, nek signo kutima:
nur saliketo en land' malproksima.
Perloj de roso sur branĉoj briletas. . .
Diru, saliko, ho kie li estas?

Certe la roson sekigos la suno.
Lin revenigi ĉu povas fortune?
Koro ne kredas al morto, komprenu!
Home lamentas salik'pro ĉagreno. .

Nevena Nedelĉeva

LA PLEJ BONA HEREDAĴO

Antaŭ multaj, multaj jaroj vivis
maljunulo kun siaj tri filoj. Foje li
venigis ilin al si kaj diris:

— Filoj miaj, eble mi ne vivos
ankoraŭ longe. Tial mi decidis doni
al vi tion, kion mi gardis por vi.
Jen ĉi tie estas sako plena je oro.
Iam ĝi estis donita al mi de la reĝo,
kies filon mi savis de morto. Tiutempe
mi estis sur la altaĵo kaj vidis la
reĝan filon fali de sur ĉevalo. Mi al-
kuris, haltigis la ĉevalon, prenis la
filon kaj portis lin al la palaco. La
reĝo esprimis sian dankon, donante
al mi la oron. Sed dum mia tuta vivo
mi ne bezonis ĝin, pro tio mi ĝin la-
sis kiel heredaĵon por vi.

Jen estas ankaŭ ora sabro. Ĝin
donis al mi giganto, kiu loĝas sur la
vidalvida alta monto. Tiam mi paŝ-
tis miajn kaprojn sur la monto. Plo-
rante, la giganto venis al mi kaj pe-
tis min eltiri ligneron, kiu estis fa-
linta en lian okulon. Mi tuj helpis lin,
eltirante la ligneron. La giganto es-
primis sian grandan dankon, donacante
al mi la sabron. Li klarigis al mi,
ke tiu, kiu portas ĝin, ĉiam venkos
en bataloj. Sed neniam mi bezonis
ĝin kaj pro tio mi lasis ĝin kiel here-
daĵon por vi.

Kaj jen tie ĉi estas violono. Ĝin
donis al mi bona virino, kiun la homoj
nomis sorĉistino kaj volis bruligi
ŝin viva. Mi savis la virinon, kaj pro
tio ŝi donacis al mi violonon, kiu
estas sorĉa. Se iu ludas per ĝi, ties
melodioj povas kuraci ĉiujn malsa-
nojn. Sed mi jam estis maljuna, miaj
manoj tremis, kaj mi ne ludis per la
violono. Mi decidis lasi ĝin por vi
kiel heredaĵon. Nun ĉiu el vi povas
elekti tion, kion lia koro deziras. . .

Apenaŭ la patro finis siajn vor-
tojn, kaj la plej aĝa filo diris:

— Paĉjo, mi volas la sakon kun la
oro.

— Bone, — diris la patro kaj do-
nis al li la sakon. — Estu tiel, kiel
vi volas.

— Paĉjo, mi volas la sabron, —
rapidis diri la mezaĝa filo.

— Jen, prenu ĝin. Estu tiel, kiel
vi volas, — diris la patro kaj donis
al li la sabron.

Fine la juna filo diris:

— Paĉjo, mi estas tre kontenta pri
la heredaĵo, kiu restis por mi. La
oro ne tentas min, nek la sabro allo-
gas min. De la komenco mem mi pre-
feris la violonon. Ĝi plaĉas al mi.
La patro donis al li la violonon

kaj benante la filojn, diris:

— Mi scias, filoj miaj, ke vi ne plu restus ĉe mi. Tial, iru al la vasta mondo kaj vivu, kiel vi volas. Sed post dek jaroj vi revenu ĉi tien. Mi volas scii, kion vi gajnis kaj akiris per la heredaĵo, kiun vi mem elektis.

— Bone, — diris la filoj, kisis la manon de la patro kaj ĉiuj ekiris sian vojon.

Flugis jaro post jaro kaj fine forflugis dek jaroj. Iun frumatenton la tri filoj revenis ĉe la pordon de la gepatra domo.

— Paĉjo, ni plenumis vian volon kaj jen ni revenis, — ili diris.

— Mi ĝojas vidi vin, filoj miaj, — diris la patro. — Nun rakontu al mi, kion vi gajnis kaj akiris per la elektita de vi heredaĵo.

— Paĉjo, — ekparolis la plej aĝa filo, — eble vi aŭdis, ke mi vivas en granda urbo. Mi konstruigis al mi grandegan domon, ĉirkaŭitan de belegaj ĝardenoj. Ĉio ĉi konkuris kun la reĝa palaco. Mi havis ĉion, kion mi volis. Estante fama komercisto, mi komercis kun landoj trans naŭ maroj, kaj la riĉaĵo alfluis kiel rivero al mia domo. Sed malgraŭ tio mi estis trankvila eĉ ne unu tagon. Tage kaj nokte mi zorgis pri mia riĉaĵo. Mi timis, ke mi perdos ĝin, aŭ ŝtelistoj forrabos ĝin. La tempo pasadis, kaj fine mi komprenis, ke mi transformiĝis en gardiston de mia riĉaĵo. Ĉar kiam ĉiuj dormis trankvile, mi tute ne dormis por ĝin gardi kontraŭ neatendita ŝtelisto. Kiam ĉiuj estis gajaj kaj ĝojaj, mia koro estis ĉiam maltrankvila, ĉar mi pensis pri miaj ŝipoj, kiuj naĝis tra maroj kaj oceanoj, pri la karavanoj kun miaj varoj, trapasantaj la dezerton. Ĉiam mi vivis en timo pri mia riĉaĵo, ĉar mi pensis, ke se mi perdos ĝin, mi ne plu povus vivi sen ĝi.

Sed foje mia ununura filino subite malsaniĝis. Mi amas ŝin kiel miajn okulojn, ŝi estas plej amata al mia koro. Mi alvokis plej famajn kuracistojn de proksime kaj malproksime,

sed vane. Ili ne sukcesis resanigi ŝin. Ŝia korpo velkis antaŭ miaj okuloj, kaj mi komprenis, ke pli valora ol ĉiuj riĉaĵoj sur la tero, ol mia tuta trezoro estas la vivo de mia infano. Tiam mi promesis oron kaj gemojn al tiu, kiu povus resanigi mian amatan filinon.

En tiu tempo mi aŭdis pri juna homo, kiu per la melodioj de sia violono povas kuraci ĉiujn malsanojn. Tuj mi ekiris serĉi lin. Mi pasis tra urboj kaj vilaĝoj kaj fine trovis lin en la piedoj de alta monto. Li estis ĉirkaŭita de multaj homoj, kiuj aŭskultis lian muzikon. Kaj mi estis ege ĝojigita kaj feliĉa, kiam mi rekonis en tiu mirinda violonisto mian amatan fraton.

— Frato mia, — mi diris al li, — mi petegas vin, venu tuj kaj resanigu mian filinon. Mi donos al vi mian tutan riĉaĵon.

La violonisto levis siajn klarajn okulojn kaj diris:

— Frato mia, se la riĉaĵo ne povas fari vin feliĉa, ĉu vi kredas, ke mi bezonas ĝin? Mi estas tre kontenta pri tio, kion mi havas. Sed nun ni iru al via filino. Mi volas vidi ŝin.

Ni ekiris kune, kaj post ni ekmarŝis la homoj, kiuj ne volis disiĝi de la violonisto. Fine ni alvenis al mia domo. Mia edzino ploris ĉe la lito de nia filino, kiu apenaŭ spiris. Tuj mia frato ekludis. En la ĉambro eksonis ĉarma melodio. En la sama momento mia filino malfermis la okulojn kaj direktis ilin al la violonisto. Ridetante al li, ŝi baldaŭ eksentis sin denove sana.

Tiam mi komprenis, ke la multa riĉaĵo ne povas feliĉigi min. Tial mi disdonis la superfluan de mia riĉaĵo al tiuj, kiuj nenion havas. Por mi jam estas klare, ke la plej grava posedaĵo estas la sano kaj la vivo. Jen tion mi komprenis kaj akiris dum la pasintaj dek jaroj, — diris la plej aĝa filo kaj kliniĝis antaŭ sia patro.

— Bone mi komprenis ĉion, filo mia, kaj vi akiris valoran instruon je



la kosto de multaj doloroj kaj suferoj.

— Paĉjo, — komencis paroli la mezaĝa filo, — eble vi eksciis, ke mi fariĝis la plej fama militestro de la reĝa soldataro. En ĉiu milito, kiun komencis la reĝo, mi estis venkinto kaj ĉiam mi restis sana kaj viva. Multaj homoj enviis al mi, pensante, ke mi estas feliĉa. Kaj vere, mi estis vestita en uniformo garnita per oro kaj ornamita per gemoj. Mi havis ĉion, kion mi povas deziri. Sed tiel mi aspektis nur ekstere. Interne, en mia animo, mi ne estis feliĉa, mi ne havis pacon, trankvilon.

Kiam mi revenadis kiel venkinto de milito kontraŭ iu najbara lando por forpreni parton de ĝia tero, kaj ĉiuj solene renkontis min, mi fermadis la okulojn pro sekreta, nevidebla doloro: en tiu momento antaŭ mia rigardo preterpasadis la teruraj bildoj de la batalo, kaj mi denove vidis falantaj sub mia sabro junulojn kaj bravajn, fortajn virojn. Kiam, gratulante min, ĉiuj premis miajn manojn, antaŭ miaj okuloj image pasis homoj sen manoj, sen kruroj, sen okuloj, dirante: „Ĉu vi vidas nin? Vi faris nin tiaj. . .“

Kiam ĉiuj homoj ripozis kaj dormis, mi vagis tutan nokton, estante maltrankvila, turmentata. Nenio ĝojigis min. Eĉ la okuloj de la reĝa filino, kiuj estas belaj kiel klaraj steloj, ne povis ĝojigi min. Fine mi grave malsaniĝis. Ĉiuj estis maltrankvilaj pri mia animstato. La reĝa filino venis ofte kaj per sia blanka mano donis al mi kuracilojn, sed nenio helpis min. Mi estis pli kaj pli malsana. Oni opiniis, ke mi mortos. Sed en tiu tempo miaj servistoj diris al mi, ke ekzistas

juna violonisto, kiu, ludante per sia violono, povas kuraci ĉiujn malsanojn. Tuj la reĝo sendis homojn por serĉi kaj trovi lin.

Kaj kiam la violonisto alvenis kaj ekstaris ĉe mia lito, mi kun ĝoja surprizo rekonis en li mian amatan fraton. Li ektuŝis per arĉo la kordojn de la violono, kaj en la ĉambro ekŝvebis arĝentaj sonoj. Tuj mi ekdormis en maro da lumo, paco kaj silento. En tiu beata stato post tiom multe da sendormaj noktoj kaj tagoj, mi ekdormis. Kaj kiam mi vekigis, mi jam estis tute sana. Tiam mi komprenis, ke la heredaĵo, kiun mi elektis, alportis al mi multe da gloro kaj potenco, sed tio ne faris min feliĉa. Mia plej juna frato elektis la veran heredaĵon, kiu donas ĝojon kaj sanon al la homoj, tial oni amas lin.

Ankaŭ mi ekvolis fari ion bonan, pro tio mi transformis la sabron en glason. Mi ĝin ornamis per gemoj kaj metis ĝin ĉe la plej grandan fontanon en la ĉefurbo, por ke ĉiuj, kiuj estas soifaj, trinku akvon per ĝi. La riĉaĵo, kiun mi posedis, ne portis al mi ĝojon, kaj mi redonis ĝin al tiuj, de kiuj ĝi estis forprenita.

Jen, paĉjo, kion mi komprenis kaj akiris dum la pasintaj dek jaroj, — finis la mezaĝa filo.

— Jes, bone vi komprenis, filo mia, kaj vi akiris valoran instruon pere de multaj viaj suferoj kaj suferoj de aliaj homoj.

— Paĉjo, — diris la malplej aĝa filo, — dum tiuj dek jaroj mi vivis kun la ĝojo de tiuj, kiujn la sorĉa violono resanigis. Kaj mi estis ĉiam feliĉa kaj kontenta.

— Jes, filo mia, ĉar vi ricevis la plej bonan heredaĵon.

Ĉu vi jam aliĝis al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj e-istoj en Plovdiv? Se ne, petu tuj aliĝilon de via societa estraro aŭ de la kancelario de BEA! Erua aliĝo helpas por pli bona aranĝo de la kongreso. Aliĝu senprokraste! Instigu viajn amikojn aliĝi!

La 40a devas esti brila manifestacio de la potenco kaj la organiziteco de la bulgara E-movado!

KOLONELO DIĈO PETROV

En la interno de Rodopa montaro inter altaj rokoj nestas fieraj agloj. Aglosimila estis ankaŭ Diĉo Petrov, naskita antaŭ 60 jaroj en sia bela vilaĝeto Progled. De sia nesto li vidis la belajn valojn, la rokojn de la ĉirkaŭaj montopintoj. Nudpieda li saltadis kun aliaj samaĝuloj tra la floraj herbejoj, kolektis fragojn kaj fungojn, admiris la gigantajn pin-arbojn kaj la kristalakvajn fontojn. Deziranta ĉion scii, Diĉo tedis per siaj demandoj al la gepatroj, sed ili ne ĉion povis klarigi al li. Tial li ofte turnis sin al la vilaĝa pastro, sed ankaŭ li ne povis respondi al liaj tiklaj demandoj. Diĉo ekmalŝatis la religiajn dogmojn kaj turnis sin al la loka instruisto Vasil, kiu klarigis al li, kiel kreigis tero kaj maro kaj kiom da popoloj vivas sur la tero. Li finstudis la elementan kaj mezgradan lernejon kaj sub la influo de sia instruisto ekdeziris studi en pedagogia instituto. Oni akceptis lin en la pedagogia altlernejo en urbo Sumen. Post tri jaroj li revenis en sian ŝatatan Rodopon kaj fariĝis vilaĝa instruisto. Krom la lecionoj Diĉo ludis al la infanoj violonon kaj instruis Esperanton, deklamis al ili vervajn versaĵojn de la fama revolucia poeto Ĥristo Botev.

Li revis daŭrigi la studadon en muzika altlernejo, sed en tiu antaŭmilita tempo oni mobilizis lin en la oficira altlernejo. Post la finstudo oni promociis lin leŭtenanto. Kiel batalionestro li veturis al vilaĝo Konsko ĉe la greka-jugoslava landlimo. La juna oficiro serĉis kontaktojn kun la vilaĝanoj kaj oficistoj ĉe la komunumo. Tie li amikiĝis kun la instruisto Atanas Karaĝov, kiu varbis lin al la eksterleĝa Bulgara Laborista Partio. Diĉo kontaktiĝis

kun jugoslavaj antifaŝistoj kaj deklaris sian pretecon helpi ilin en la batalo kontraŭ la germanaj faŝistoj. Liaj soldatoj vidis en li honestan estron. Li anoncis kurson de Esperanto. Kelkdekoj da soldatoj ekdeziris lerni la lingvon. Diĉo posedis nur unu lernolibron, tial instruis laŭ la rekta metodo. Kiel helpilon li uzis sian ŝatatan violonon.

La plejparto de la soldatoj de lia bataliono estis progresemaĵoj junuloj, ĉefe el suda Bulgario. Iom post iom li amikiĝis kun ili kaj konvinkis la plej influhavajn transiri al la partizanoj. Minacita per aresto iun tagon de decembro 1943 la juna leŭtenanto ordonis viciĝon de la bataliono. Li alpaŝis la soldatojn kaj verve ekparolis:

— Kamaradoj, el la leteroj, kiujn vi ricevas kaj kiujn mi legas kiel via estro, videbliĝas, ke viaj gepatroj mizeras pro la faŝista regpotenco, kiu fordonas la nutraĵojn kaj riĉaĵojn de nia lando al la hitleranoj. Nia popolo servutas al la germanaj kapitalistoj. La monarkofaŝista diktaturo sendis nin ĉitien subpremi la jugoslavan vilaĝanaron. Tion ni plu ne toleru. Ni aliĝu al la jugoslavaj partizanoj, por helpi ilian batalon kontraŭ la germanaj okupantoj. Kiu deziras batali kontraŭ la faŝistoj, li anoncu sin. . . Ni fondos soldatan batalionon kaj baptos ĝin je la nomo de nia amata bulgara revoluciulo — Ĥristo Botev.

Pli ol 70 soldatoj deklaris pretecon sekvi sian estron.

Sultron ĉe ŝultro kun la jugoslavaj partizanoj, la soldatoj de leŭtenanto Diĉo Petrov batalis kontraŭ la jugoslavaj helpantoj de Hitler. Ĉe monaĥejo Pĉinja ili disbatis taĉmenton de jugoslavaj faŝistoj kaj daŭrigis sian

vojon al Bulgario. Ili piedmarŝis pli ol 2500 kilometrojn, disbatis pli ol dudek faŝistajn bandojn. Survoje al Bulgario al ili aliĝis ĉiam pli kaj pli da bulgaraj antifaŝistoj.

Dum monato majo la bataliono de Diĉo Petrov jam atingis la Balkanon. La ĉefa stabo de la Bulgara Popolliberiga Armeo promociis lin kolonelo. Freneziĝinta la faŝista registaro mobilizis grandajn fortojn por kontraŭbatali la ribelintajn soldatojn. Malgraŭ la laciga batalplena marŝado la kunbatalantoj de Diĉo fidele sekvis lin. Dum la ripoztagoj li parolis al ili, ludis revoluciajn melodiojn per la violono, subtenis ilian spiriton, promesis ripozon en Rodopo-montaro.

— En la praarbaroj de nia legenda Rodopo ni fondos popolan respublikon, renkontos la ruĝarmeanojn, kiuj baldaŭ aliros Danubon, kaj helpos

al nia popolo liberiĝi el sub la jugo de la monarkofaŝista diktaturo. . .

Sed la kara Rodopo restis nur revo. Li ne plu vidis ĝin. . . Apud vilaĝo Batulia, distrikto de Sofio, perfidulo denunciis la batalionon. Ĝin ĉirkaŭis faŝistaj regimentoj. En tiu lasta batalo de bataliono „Ĥristo Botev“ pereis ankaŭ la brava filo de Rodopo Diĉo Petrov. Tiam li estis apenaŭ 25-jara.

Nun ĉiu kiu veturas al urbo Smoljan, rimarkas preter la ŝoseo apud vilaĝo Progled imponan ŝtonmonumenton de Diĉo. Ŝajnas aglo fidele staras garde al sia amata socialisma patrujo.

Ĉiuj esperantistoj, kiuj gastas en Pisanica, haltas ĉe la monumento de la heroo-esperantisto kaj metas flo-rojn ĉe la piedoj. . .

Vortoj de antaŭ 350 jaroj

RENE DEKART (RENÉ DESCARTES, KARTEZIO)

(11. III. 1596—11. II. 1650)



Dekart estas granda franca filozofo kaj matematikisto. Li studis en la jezuita lernejo „La Sago“ en urbo Anĵuo.

En la komenco de la 30-jara milito Dekart militservis en la armeo, kiun li forlasis en 1621. Tuj poste li entreprenis kelkjaran vojaĝadon (1621—1629). La patro rimarkis la grandan sciencemon de sia filo. Dezirante sekurigi al li liberan, sendependan vivon, li vendis parton de sia bieno kaj la monon disponigis al li. Pro furiozaj persekutoj fare de la inkvizicio en Francio Dekart enmigris Nederlandon. Tiutempe ĝi estis la plej progresema kaj libera lando en Eŭropo. Nederlando fariĝis dua patrujo por multaj sciencistoj, pentristoj kaj alispekaj talentuloj, kies spirito estis subpremata de la katolika obskurantismo.

Dekart restis en Nederlando preskaŭ ĝis la fino de sia vivo (1629—1649), entute 20 jarojn. Ĵus alveninte en iun urbon li ekiris sur la stratoj por serĉi dormlokon. Lin impresis freŝaj aŝiĝoj, disgluitaj tra la urbo. Dekart petis la unuan renkontitan homon traduki la aŝiĝan tekston. Tiu tradukis latine la aŝiĝon, kaj Dekart kun miro konstatis, ke per aŝiĝo estas publike

diskonigita la teksto de malfacila matematika tasko. Li reskribis la tekston kaj danke adiaŭis la afablan sinjoron. La sekvan tagon, jam frumatene, Dekart portis la solvon de la matematika tasko al la adreso, montrita en la afiŝo. Kun granda surprizo li renkontis la saman ĉ. 30-jaran nederlandanon, kiu pasintan tagon estis afabla traduki al li la tekston de la afiŝo. Tiel li konatiĝis kun la plej fama tiutempa nederlanda matematikisto.

Dekart sin izolis en Nederlando kaj dediĉis sin al monrabaj eksperimentoj kaj temporabaj primeditoj. Li verkis pri filozofio, fiziko kaj fiziologio. Liaj sciencaj verkoj estas presitaj latinlingve en Nederlando. Iuj mecenatoj el Nederlando kaj Francio proponis al li subvencion aŭ eĉ monatan salajron, tre altajn, tamen li rifuzis, dezirante esti tute libera en sia rezonado. La mono, kiun li ricevis de sia patro antaŭ la forveturo al Nederlando, kaj la enspezoj, kiujn li ricevis el la vendado de siaj verkoj, sufiĉis por vivteni sin.

La 20 an de marto 1626 dum kelka tempo la loĝantoj de Romo spektis mirindan fenomenon. Krom la ordinara suno oni vidis apude ankoraŭ kvar sunojn. La katolikismo konsideris tion averta signo de la ĉielo. Kiam la novaĵo atingis Dekart, li unua en la mondo science klarigis la fenomenon per reflektado de la sunradioj. Tiel Dekart batalis kontraŭ misuzoj fare de la religio pri raraj naturaj fenomenoj kaj aĉeraĵoj.

Ok monatojn poste Dekart ricevis leteron el Parizo. Lia bonega amiko Mersenne (1588—1648), teologo kaj sciencisto (la unusola homo el Francio, kiu konis lian adreson kaj regule korespondis kun li), per letero demandis: „Ĉu estas ebla universala lingvo?” La 20 an de novembro 1629 Dekart skribis al li sian faman leteron:

„Artefarita lingvo estas ebla, kaj oni povas trovi sciencojn, kiu formulos ĝiajn principojn. . . tiu lingvo havus unu specon de konjugacio kaj vortkonstruo. Ĝi tute ne havus formojn neplenajn aŭ neregulajn. La ŝanĝoj devas esti formataj per afiksoj. . . ĉi tiuj afiksoj troviĝus en la ĝenerala vortaro. . . Helpe de tiu ĉi lingvo kamparano juĝos pri la senco de la aferoj pli facile, ol tion nun faras filozofoj.

Estas multaj personoj, kiuj volonte oferus kvin aŭ ses tagojn da tempo por povi kompreni ĝin kun ĉiu homo. . . Mi kuraĝas esperi, poste, universalan lingvon tre facilan por ellerni, por prononci kaj por skribi, kaj kiu, kio estas la ĉefa afero, helpus al la racio, prezentante al ĝi ĉiujn aferojn tiel distinge, ke por ĝi (por la racio) estus preskaŭ maleble erari. . .”

Tiu Dekart-penso pri universala lingvo de ĉi momento (20. XI. 1629) revolociigis la intelektojn de eminentaj sciencistoj kaj praktikuloj. Nun, 350 jarojn post tiu fama letero, oni povas diri, ke la prognozo de la granda pensulo Rene Dekart komplete realiĝis en Esperanto.

Canko Murgin

Distroĵ

ETAJ HUMURAĴOJ

La edzino:

— Mi tute ne povas kompreni, kara, kial la supo ne plaĉas al vi. Ja lunde ĝi plaĉis al vi, marde plaĉis, merkrede plaĉis, kaj hodiaŭ vi puŝas la teleron. . .

*

Adamo estis la nura viro, kiu ne povis diri: „Pardonu, junulino, ĉu mi ne vidis vin ie?”

*

— He vi, la malgranda, ŝu vi ne hontas fumi? Ĉu tiel oni instruas vin en la lernejo?

— Ne, mi ankoraŭ ne vizitas lernejon.

En ĉi tiu angulo ĉiu frato
gajulo povas sidi kaj ridi.

SPRITAJ DEMANDOJ

Ĉu vi scias, ke :

se via kolo estus dika, tio estus kol-ego kaj ero de ĝi estus kol-ero?

se vi dispecigus vian liton kaj prenos eron, tio estus lit-ero?

se vi dispecigus kulon, ĉiu peco estus kul-ero?

multaj eroj faras eraron?

persono, kiu ŝatas grati, estas grat-ulo? Tian oni ofte sendas per sen-data letero.

Ĉu vi estas :

in-tima amiko?

preta por-kino?

sen-tema aŭ sent-ema viro?

Verdaj ŝteloj

MI PARTOPRENIS LA INFANAN KONGRESETON

La 17a Internacia Infankongreseto okazis en Lucerno (Svislando) samtempe kun la 64a Universala Kongreso de Esperanto. Ni, la infanoj, kolektiĝis en la kongresejo de UK kaj de tie per aŭtobuso veturis al la urborando, kie nin atendis nia kongresa hejmo. Tie mi kaj ankoraŭ du bulgaraj infanoj troviĝis inter 24 infanoj el 12 landoj (Francio, Usono, Japanio, FR Germanio k. a.). Kvan-kam el diversaj landoj de la mondo, ni bone interkompreniĝis per la internacia lingvo Esperanto. Foje estis, kompreneble, ankaŭ ridigaj momentoj. Jen mia amikino Gelare el Irano demandas:

— Al kiu apartenas tiu „ĉorapo“?

Ni, la bulgaroj, surprizite unuvoĉe ankaŭ demandas:

— De kie vi konas tiun vorton? Ĝi estas bulgara vorto. . .

— En nia lingvo ankaŭ estas „ĉorap“ — respondis ŝi.

Kaj ni longe ridis. . .

Tiel gaje ni pasigis la tutan kongresan semajnon. Ĉiutage ni ekskursis. Ni promenis en la proksima arbareto kaj penis kapti fiŝojn en la lageto. Ni vizitis muzeon de la glacia epoko, la zoologian ĝardenon. Ĉarma estis la ekskurso al montopinto Pilatus en la Alpoj. Oni veturas supren per dentrada vagonaro. De sur la supro ni vidis mirindan panoramon: la granda kvarkantona lago trankvile lavis la piedojn de la montaro; sur la bordo apenaŭ videblis dometoj en ĉarma verdaĵo. Malantaŭ ni traboris la ĉielon neĝeblanka pinto.

Tie ni vidis interesajn sportludojn: de sur rokoj ekflugs du homoj per flugiloj, faris belan rondon en la aero kaj malaperis en la malproksimo. Ni revenis per ŝipo sur la granda lago.



La malgranda kongresanino Isja en Trieste Italio

Ankoraŭ multon ni vidis. Tio estis unu semajno de fortaj travivaĵoj kaj bela internacia amikeco.

Isja Oljanova, 9-jara

Ekspozicio de infan-desegnaĵoj en Finnlando

Pro la Internacia Jaro de la Infano kaj kiel oficiale akceptitan programon de la Tagoj de Oulu, la loka E-societo en Oulu, Finnlando, aranĝis internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj. Por la ekspozicio alvenis entute 1500 desegnaĵoj el 24 landoj, el kiuj Argentino estis la unua ne nur en la alfabeto ordo, sed ankaŭ laŭ la nombro — 332 desegnaĵoj. La ekspozicio estis aranĝita en la aŭlo de la Popola Instituto. Ĝin vizitis dum la du semajnoj kelkaj miloj da rigardantoj. La formo de la ekspozicio prezentis „internacian vagonaron“ kaj donis belan impreson pri tutmonda amikeco kaj pri la bezono de la Internacia Lingvo.



ELDIROJ PRI LA INFANASEMBLEO OKAZINTA EN SOFIO

S-rino Estefania Aldaba—Lim el la Filipinoj — speciala rajtigito de la Ĝenerala Direktoro de UNO kaj speciala reprezentanto por la Internacia Jaro de la Infano:

„La kontribuo de Bulgario por la Internacia Infanaro estas eksterordinara kaj historia. Vi kolektis ĉi tien infanojn el 75 landoj el la tuta mondo, por ke ili povu aperigi kaj profundigi siajn amikecon kaj interkompreniĝon. Sed ne estas nur tio; la ideo ebligi al ili kune krei, ludi muzikajn instrumentojn, interŝanĝi pentraĵojn, versaĵojn kaj verkojn estas treege originala kaj eksterordinara. Mi opinias, ke tiu ĉi okazaĵo estas unu el la plej eksterordinaraj, kaj eble eĉ la plej eksterordinara, en la kampo de la arto kaj la infano kiel temo en la Internacia Infanaro.

Dum mia vizito en Bulgario mi havis la eblecon vidi kio estas farita por la infano, kaj mi estas profunde impresita de ĉio. La bulgaraj infanoj estas tiom amindaj, sinceraj kaj krome tre artismaj. Mi opinias, ke tio ĉi ŝuldiĝas ne nur al persona talento, sed ankaŭ al la ŝtata politiko. Via ŝtato zorgas jam ekde la fruaj infanaj jaroj pri tio, ke la infanoj estu enkondukitaj en la arton. Tio ĉi estas tre, tre grava por disvolviĝo de artisteco ĉe la infano.“

Mi estas 12-jara lernantino en la 6a klaso. Mi ludas pianon jam ses jarojn. Mi ĝojas, ke mi venis ĉi tien, kie estas tiom multe da infanoj.

Al ni estas malfacile imagi ĝuste la estontcon, sed ŝajnas al mi, ke unu afero dependas de ni, la infanoj: estas necese fari ĝin tia, kia ĝi estas en niaj revoj. Mi volas, ke ĉiuj infanoj fariĝu amikoj, ili kantu kune, pentru kune kaj ludu kune. Ĉar de ilia amikeco dependas la paca estonteco.

La bulgaraj infanoj estas multe, multe sunaj kaj ĝentilaj. Ili ne dividas la infanojn je blankaj kaj nigraj. Tie ĉi ĉio estas „all right“ (olralt), t. e. bonege. **Turney Richard, Usono**

NIKOLA MIĤAJLOV



Hiboruĉi — komentisto en la Televida kompanio ASAHU, Tokio:

„La bulgaraj infanoj, kun kiuj ni renkontiĝis kaj kiujn ni vidis, estas edukitaj, tre disciplinitaj kaj kleraj. Min impresis la varmaj zorgoj pri la infanoj fare de la plenkreskuloj. Ĉie, kien la infanoj, partoprenantoj en la Asembleo, iris al vizito, ili estis renkontitaj kun tre granda atento.

Bulgario estas tre alloga lando, kun riĉa kampara mastrumo, fruktodona tero, suno. La bulgara popolo estas amikema kaj tre aminda. Mi intencas montri al la japanaj spektantoj ĉefe la kontaktojn inter la infanoj, kiuj tiel bone interkompreniĝas tie ĉi en Sofio. Mi esprimas mian dankon al la bulgara registaro pro la organizo de la Infanasembleo. Ĝi estas la plej grava aĵo, kiun ni devas montri al la spektantoj. Krome Bulgario kiel lando estas tre malsama de la nia. Malgraŭ tio persone mi opinias, ke la kunekzistado, la reciproka kompreniĝo kaj la amikeco estas eblaj. Kiel ĵurnalisto mi montras tion, kion mi vidis tie ĉi. Sendepende de la malsamaĵoj inter ambaŭ landoj, la infanoj interkompreniĝas kaj komunikiĝas. Kaj kial ne ankaŭ la plenkreskuloj? Tion mi diros konklude en mia speciala programo pri la Asembleo.“

Li naskiĝis en u. Sliven en la familio de teksa laboristo. Sciama kaj laborema, Nikola finis gimnazion en sia naskiĝurbo, laborante nokte en teksa fabriko por vivteni sin. Jam tie, en la fabriko, li aliĝis al la revolucia movado. Li partoprenis aktive ankaŭ en la septembra Ribelo 1923. Pro lia revolucia batalo oni eksigis lin el la laborloko en 1942.

Post la liberiĝo el la faŝismo, loĝante en Sofio, Nikola Miĥajlov plenforte partoprenis la konstruadon de nova vivo en nia patrolando. Pro lia honesta batalo li estas honorita per multaj medaloj kaj ordenoj kaj rekonita kiel aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo.

Esperanton N. Miĥajlov lernis kiel studento kaj aktive laboris en la vicoj de la bulgaraj e-istoj. Post la liberiĝo li estis unu el la fondintoj de la Bulgara E-Kooperativo kaj aktivulo de la sofia E-societo „Maksim Gorkij“, sindone laboris por la konstruado de montodomo „Esperanto“ sur Vitosha. La internacia lingvo E-to kaj la E-movado estis la granda amo de lia tuta vivo.

